

# informilo **por** interlingvistoj



Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj

19-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 74 (3/2010)

## Enhavo

|     |   |    |
|-----|---|----|
| 1   | <b>P. Stojan: de entuziasma interlingvisto al forgesita ermito</b> ( <i>A. Sidorov</i> )..... | 2  |
|     | <b>Bibliografio de Petro Evstafjeviĉ Stojan</b> .....   | 5  |
|     | <b>Artikolaro de Petro Stojan</b> .....   | 6  |
| 2   | <b>Interlingvistikaj artikoloj en „grkg“</b> ( <i>Věra Barandovská-Frank</i> ).....           | 7  |
| 3   | <b>Interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj</b> .....                  | 13 |
| 3.1 | <b>Altlernejaj studofinaj disertacioj</b> .....   | 13 |
| 3.2 | <b>Diplomlaboraĵoj de la Internaciaj Interlingvistikaj Kursoj en Poznań</b> .....             | 14 |
| 3.3 | <b>Statistiko pri kursoj en altlernejoj</b> ( <i>Germain Pirlot</i> ) .....                   | 14 |
| 3.4 | <b>Interlingvistiko por filozofoj ĉe la Universitato de Milano</b> ( <i>F. Gobbo</i> ) .....  | 14 |
| 4   | <b>Duroluma festlibro por prof. d-ro So Gilsu</b> .....                                       | 16 |
| 5   | <b>Mark Fettes en Parma</b> ( <i>Paolo Valore</i> ) .....                                     | 16 |
| 6   | <b>Novaj eldonaĵoj</b> .....  | 17 |
| 6.1 | <b>La disertacio de LIU Haitao</b> .....  | 17 |
| 6.2 | <b>Esperanto en tradukscienca libro de Heidemarie Salevsky</b> .....                          | 17 |
| 6.3 | <b>“Cejano”</b> .....   | 18 |
| 7   | <b>Novaj revuoj</b> .....   | 18 |
| 7.1 | <b>“European Journal of Language Policy” 2</b> .....  | 18 |
| 7.2 | <b>“InKoj”</b> : Nova interlingvistika revuo en la Interreto.....                             | 19 |
| 8   | <b>Diversaĵoj</b> .....   | 20 |
| 8.1 | <b>Ekspozicio en Rumanio</b> .....  | 20 |
| 8.2 | <b>GIL en Bremen</b> .....  | 20 |

\*\*\*

# 1 Petro Stojan: de entuziasma interlingvisto al forgesita ermito

*Anatolo Sidorov* (Sankt-Peterburg)

**Stojan Petro Evstafjeviĉ** (1884.VI.22, Izmailo, Besarabio, Ruslando -- 1961.V.03, Nico, Francio), sciencisto, leksikografo, kompilanto de vortaroj, tradukisto, aŭtoro de pli ol 30 verkoj en la lingvoj rusa, franca kaj Esperanta.

Stojan okupiĝis pri la sekvaj temoj: ornitologio, panslavismo, lingvistiko (etimologio, semantiko, fonetiko), prehistorio, mitologio, etnografio, religia historio, astronomio, biozofio. Li esploris la evoluon de hindeŭropaj lingvoj kaj popoloj. Li estas aŭtoro de pli ol deko da artefaritaj lingvoprojektoj. Por siaj verkoj li uzis 11 pseŭdonimojn<sup>1</sup>: *O. Ŝulerc* (anagramo - Ŝerculo), *Nikolajev*, *R. Pranicki*, *P. Radoviĉ*, *P. J. Troost*, *Stoyan*, *O. D. Ribaulb* (inverse - Blua birdo), *Petraŝeviĉ*, *V. Paviĉ*, *Bibao*, *Abel*.

Petro Stojan naskiĝis en la jaro 1884 en Izmailo, Besarabio, tiam apartenanta al Ruslando. La loĝantaro de la urbo konsistis el rumanoj, rusoj, grekoj, bulgarioj, germanoj kaj ciganoj. Laŭ la propra klarigo lia denaska lingvo estis la rusa, sed li rigardis sin serbo rumandevena. La familio de Stojan originis el Makedonio.

Li frekventis la Riŝeljean Liceon en 1903 en Odeso. Dum la Unua Ruslanda Revolucio de 1905 Stojan estis ekzilita al la nordorienta urala urbeto Ĉerdyn' (nun troviĝanta en la Perma regiono)<sup>2</sup>. Poste, en 1906-07, li estis en Parizo. De 1907 ĝis 1917 Petro Stojan aktive partoprenas la Esperanto-agadon en Peterburgo.

Petro Stojan esperantistiĝis en 1903, sed ricevis kontentigan scion nur post 3 jaroj, veninte en 1906 al Parizo, malgraŭ la scio de la greka, latina, franca, iom germana kaj denaska rusa lingvoj. En Parizo lin helpis *Gabriel Chavet* kaj *Emile Boirac*, la lasta fariĝis lia spirita patro en Esperanto. Ekde 1907 Stojan estas aktiva partoprenanto en la Esperanto-agado de la Peterburga esperantistaro. Peterburgaj esperantistoj aranĝis Esperanto-ekskursojn al apudurbaj vidindaĵoj, prelegis pri Esperanto, preparis ekspoziciojn por vasta publiko, eldonis propagandan literaturon.

En la Peterburga universitato en esperantista grupo studenta, en kiu Stojan estis kasisto, en 1910 estis ĉ. 100 anoj, kiuj ne nur pagis kotizon, sed aktive propagandis Esperanton<sup>3</sup>. Dum la jaro 1910 Stojan partoprenas la 1-an Tutruslandan Esperanto-Kongreson (3-8 majo)<sup>4</sup>, gvidas Esperanto-kurson<sup>5</sup>, prelegas, eldonas lernolibron de Esperanto por rusoj<sup>6</sup>.

En la jaro 1912 Stojan kun *R.Lorencson* aranĝis Esperanto-ekspozicion<sup>7</sup>. En 1912 kun *V. Neĵinskij* li eldonis broŝureton titolitan "Necesaj scioj pri Esperanto", kiu estis reeldonita en 1913, en korektita kaj kompletigita versio. Pri la broŝuro dufoje aperis pozitiva recenzo en la populara revuo "Naturo kaj Homoj" (1913, n-ro 13; 1914, n-ro 24).

En 1913, okaze de la 10-jara jubileo de scienca-populara revuo "Heroldo de Scio" ("Vestnik Znanija"), Stojan prelegas pri "Geografio de Albanio"<sup>8</sup>.

En 1913 dank'al klopodoj de organiza komitato, kiu konsistis el s-oj *Ĉernoĥvostov*, *L. Vasiljev* kaj *P. Stojan*, estis restarigita la malnova societo "Espero"<sup>9</sup>.

En 1911 la "Ruslanda Ligo Esperantista" estis fermita kun ĉiuj siaj filioj, inkluzive "Espero-n", laŭ ordono de Ministro de l'internaj aferoj pro la fifama Postnikov-proceso. La 16.03.1913 okazis la unua oficiala kunveno de la restarigita societo en la Pedagogia Muzeo (Fontanka, 10).

<sup>1</sup> Golden B. La plumnomoj de Petro Stojan // *Dia Regno*, 1982, № 1-2 (Jan.-Feb.), p.2384.

<sup>2</sup> Stojan P. Mia juneco kaj esperantistiĝo // *Heroldo de Esperanto*, 1961, № 15, p.1-2.

<sup>3</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1910, № 3, p.2-3.

<sup>4</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1910, № 4, p.1.

<sup>5</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1910, № 10, p.4.

<sup>6</sup> Davidov G. Lernolibroj de Esperanto por Rusoj. 1887-1912, Saratov, 1913, 22 p.

<sup>7</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1912, № 7, p.119.

<sup>8</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1913, № 2, p.30.

<sup>9</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1913, № 4, p.64.

Fine de 1913 “Espero” unuanime decidis proponi s-on P. Stojan kiel kandidaton por la Lingva Komitato<sup>10</sup> (nun Akademio de Esperanto). Stojan estis membro de la L.K. de 1914 ĝis la dua Mondmilito.

En 1913 Stojan prezentis al la vasta ruslingva publiko sian ideon pri la rolo de Esperanto kiel tutslava lingvo por la slavaj popoloj. Unue la ideo estis publikigita en la ruslingva ĵurnalo “Slavo” (“Slavjanin”, 1913, n-ro 14). Stojan konsideris aktualajn esplorojn<sup>11</sup>.

En 1914 sekvis la ruslingva broŝuro, lia “Slavaro kaj Esperanto” (“Slavjanstvo i Esperanto”). Bedaŭrinde la komenciĝinta Mondmilito ne permesis evoluigi lian ideon pri la rolo de Esperanto kiel tutslava lingvo, tamen liaj esploroj daŭris ĝis 1916.

En 1915 s-ro P. Stojan estas invitita de la Rusa Akademio por kunlaboro en la kompilado por la Malgranda Vortaro de Rusa Lingvo. En 1916 aperis “Malgranda klariga vortaro de la rusa lingvo”.

Dum 1915-16 Petro Stojan faris vojaĝon al apudfrontaj regionoj. Li vizitis Rumanion kaj Serbion. Sur la paĝoj de “La Ondo de Esperanto” aperis lia tuta serio de “Vojaĝaj notoj”.

En 1916 dank’ al klopodoj de spertaj esperantistoj – inter la kunfondintoj estas ankaŭ P. Stojan – en Petrogrado estis fondita la rondeto “Kosmoglot”<sup>12</sup>. La rondeto servis kiel bazo, sur kiu formiĝis kolektivo de fortaj, spertaj kaj eminentaj lingvistoj. “Kosmoglot” dum 1916-1921 esploris la mondlingvajn problemojn, prezentis internaciajn lingvojn, pridiskutis kaj komparis diversajn planajn kaj artefaritajn lingvojn. En libro, aperinta en 1929, Stojan priskribas la agadon de “Kosmoglot”:

“La petrograda societo “Kosmoglot” estis fondita en marto 1916, post la preparaj diskutoj kaj laboroj, komencitaj ankoraŭ en Riga 1912-14 inter *V. Ŝmurlo, V. Ĉeŝihin kaj P. Stojan*. La iniciativo kaj la nomo de la soc[ieto] venis de *Ĉeŝihin*, kiu poste, en 1915, pro la militaj cirkonstancoj, forlasis Rigan kaj ekloĝis en Petrogrado, kie li instigis al mondlingvaj studoj kaj diskutoj kaj proksimigis (ĝis tiam malamikajn) adeptojn de diversaj sistemoj. Laŭ iniciato de *E. Drezen* tiam okazis, en la Teknologia Instituto, paroladoj de *Romanov, Drezen, Rosenberger, Stojan, Ĉeŝihin* - pri mondlingvaj temoj. Post tio, la hejmo de *Rosenberger* - prezidinto de Volapŭka Akademio – servas kiel renkontejo por fondantoj de Kosmoglot: *Boduen-de-Kurtené (Jan Baudouin de Courtenay), Ĉeŝihin, Stojan, Ŝmurlo, Drezen*, al kiuj poste aliĝis *Linzbach*<sup>13</sup>, *De Wahl, Yuŝmanov [Juŝmanov]*, k.a.”<sup>14</sup>

De post 1917 Stojan certe mem jam ne plu povis partopreni en la fruktodona agado de “Kosmoglot”. Lia lasta iniciato estis klopodo por eldoni revuon. En januaro 1917 grupo de Petrogradaj esperantistoj (*T. Ŝĉavinskij, S. Hajdovskij, P. Stojan*) petis permeson eldoni revuon kun la nomo “Verda Radio”, sed la Petrograda guberniestro *Ĥabalov* taksis tiun iniciaton neĝustatempa<sup>15</sup>.

Petro Stojan forlasis Ruslandon dum la rusa revolucio kaj la komenciĝanta intercivitana milito kaj formigris eksterlanden, laŭ itinero konata laŭ vojaĝo en 1915. Li loĝis en

---

<sup>10</sup> *La Ondo de Esperanto*, 1913, № 11, p.176.

<sup>11</sup> “Adresaro de slava junularo“, Peterburg, 1914. Laŭ ĝi inter 83 rusoj, kiuj notis sciatajn lingvojn: 50 notis Esperanton (60%), 20 la germanan (24%), 16 la francan (11%), 4 la anglan (5%). Inter ĉeĥoj notis Esperanton 50%, la rusan 28%, la germanan 15%, la francan 7% // *La Ondo de Esperanto*, 1914, N 4, p.82.

<sup>12</sup> Drezen E. SESR na jazykovednom fronte (SEU en la lingvosciencia fronto) // *Mejdunarodnyj jazyk* (“Internacia Lingvo“), 1932, N 9-10, p.291-292.

<sup>13</sup> Rimarko de la redaktoro de IpI: Antaŭ nelonge reaperis grava verko de Linzbach en la rusa: Ja., I. Linčbaĥ (2009): Principy filosofskogo jazyka. Opyt toĉnogo jazykoznanija. Moskva: URSS, 234 p. , ISBN 978-5-397-00338-4. La libron afable havigis al mi Anatolo Sidorov.

<sup>14</sup> Stojan P. “Bibliografio de internacia lingvo“, Genève, 1929, p.197.

<sup>15</sup> Drezen E. „V borbe za SESR. Zаметki po istorii sovetskogo Esperanto-dviĝenija“ („En batalo por SEU. Noticoj pri la historio de la sovetia E-movado“) // „*Mejdunarodnyj Jazyk*“ („Internacia Lingvo“), 1932, № 4, p.103-109.

Jugoslavio, Rumanio, Svislando kaj Francio. Tamen Stojan restis fidela al kreema agado. Ekde 1911 oni registris dekon da lingvaj projektoj, de li kreitaj.

De 1919-22 li instruis kiel profesoro de liceo en Serbio.

En aŭtuno 1922 Stojan revenas al Besarabio, tie li vegetas en Kiŝinev ĝis 1925. Malgraŭ malkomforta vivo Stojan verkas la broŝuron “Evoluo de Esperanto” (aperontan en 1937 kaj, en pli bona versio, en 1948) fine, kiel libreton “Deveno kaj vivo de la Lingvo Esperanto” eldonita en 1953.

Ekde marto 1925 Stojan loĝas kaj laboras en Svislando.

Dank’ al financa subteno de sinjorino *Alice Vanderbilt Morris*, esperantistino de 1924 kaj honora sekretario de International Auxiliary Language Association (IALA), Stojan en 1926 ricevis permeson labori en la riĉa UEA-biblioteko<sup>16</sup>. Dank’ al lia skrupula kaj diligenta laboro en 1927 aperis “Katalogo de lingvoj naturaj, popolaj, literaturaj, klasikaj kaj artefaritaj”. En 1929 sekvis “Bibliografio de internacia lingvo”. A. Morris malavare financis la eldonadon de la libro, kiun Stojan al ŝi dediĉis.

En 1925, okaze de la UK en Ĝenevo, laŭ peto de *Edmond Privat*, kiu planis prezenti Universalan Kongreson brila, Stojan preparas prelegon pri “Evoluo de Esperanto”.

Stojan prelegis enkadre de la Internacia Somera Universitato pri “Evoluo kaj Esperanto”. Li planis vidi la prelegon broŝurforme, sed la funkciuloj en UEA rifuzis ĝin pro tio, ke en la verko aperis la unuaj kritikoj kontraŭesperantaj flanke de Stojan. Artikoleto titolita “Pri la evoluo de Esperanto” aperis en 1925 en “La Progreso”, eldonita en Prago, kaj la sekvantan jaron lia teksto “Principoj de Esperanto” estis publikigita en “Kataluna Esperantisto”. Libroforme Stojan vidis sian verkon nur en 1953, kiam Flandra Esperanto-Instituto eldonis “Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto”. Ĝuste en 1953 Stojan faris publikaj siajn kritikojn kontraŭ Esperanto en la libro. La verko elvokis inter la esperantistaro ardajn disputojn kaj diskutojn<sup>17</sup>.

En 1937 okaze de la jubilea kongreso de Esperanto, kvindek jarojn post la naskiĝo de la lingvo, aperis “Ora Libro de la Esperanto-Movado”, en kiu multaj eminentaj esperantistoj provis prognozi la estontecon de Esperanto dum la sekvaj 50 jaroj. Ankaŭ profetis Petro Stojan. Eĉ ne unu el liaj profetaĵoj realiĝis<sup>18</sup>. Des pli dubindaj estas liaj esploroj pri evoluo de la hindeŭropaj lingvoj kaj popoloj, kiuj estis traktitaj en lia verko “Vindiana”.

De 1931 Stojan laboras kaj vivas en vilaĝo apud Nico en Francio.

La modifado de Esperanto ne estis la fina celo de Petro Stojan, kiu havis la intencon krei tute novan lingvon. La unua provo sur tiu ĉi tereno estis “Renova”, la nomo de liaj nepublikigitaj projektoj de la jaroj 1947-1953. Dum tiu periodo Petro Stojan poluras sian teorion pri la evoluo de la hindeŭropaj lingvoj kaj popoloj, prezentitan en la “Vindiana”. Ĝia fundamenta kerno estas, ke “*la voĉorgano kaj la psiko estas regataj de la korpo, kiu dependas de la socia kaj klimata ĉirkaŭmedio*”. La fama *Gaston Waringhien* karakterizas la teorion kiel “*hîmera fantaziaĵo*”<sup>19</sup>.

Ĉe la fino de la vivo de Petro Stojan ne multo restis de la entuziasma interlingvisto de la 1920-aj jaroj. Dum la lastaj jaroj de sia vivo, li ne estis normala laŭ menssana vidpunkto, ĉar li sendube suferis pro persekutkomplekso. Li ne havis deziron kontakti kun lokaj esperantistoj, ĉar iam okazis disputo inter li kaj fervoraj esperantistoj, ne dezirantaj proponojn de Stojan por reformi Esperanton. Rezulte de la disputo Stojan ricevis frapon kontraŭ la kapo kaj perdis okulon.

En sia bieneto proksime al vilaĝo apud Nico, Petro Stojan vegetis en kabano plenplena de kelkaj libroj kaj granda nombro da kajeroj enhavantaj senfinajn listojn de vortoj kaj iliajn variaĵojn tra la tempo kaj en diversaj landoj. Pri lia vegeta stato najbaroj informis la urbestron. La urbestro kontraŭvole de Stojan, devigis lin eniri la Pasteur-Hospitalon en Escarane. Tie la mensa stato de Stojan eĉ pli malboniĝis. La esperantistoj en Nico ne plu sciis pri li, do ili ne

<sup>16</sup> van Dijk, Z. “La Asocio.Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA“, Antverpeno, 2008, 301 p.

<sup>17</sup> Golden B. Petro Stojan - malesperantisto // *Literatura Foiro*, 1981, № 70, p.13-17.

<sup>18</sup> Golden B. La misa profetaĵo de Petro Stojan // *Literatura Foiro*, 1980, № 59, p.8-13.

<sup>19</sup> Waringhien G. “Lingvo kaj Vivo“, La Laguna, 1959.

povis helpi lin. Ankaŭ Stojan mem estis ja tro fiera kaj sendependa persono por peti ies helpon. En siaj lastaj jaroj Stojan estis senpatrujano, sen monrimedoj, kaj tute izolita kaj forgesita, ankaŭ de la esperantistaro. Deprimita de la situacio, li decidis fini sian vivon: la 3-an de majo 1961 lia korpo estis trovita en la haveno de Nico.

Restas ankoraŭ kelkaj neklarigitaj aspektoj de la vivhistorio de P. Stojan, ĉar li havis du filojn, unu naskitan en 1909 en Ruslando, la alian en 1953 en Francio. Kiu(j) estis la edzino(j) de Stojan, kaj kio okazis al la filoj?

Ankaŭ restis manuskriptaj verkoj de Stojan. La plej grava nepresita verko de Stojan konsistas el tri manskribitaj volumoj kun 1200 paĝoj kaj 100 figuroj. La tuta kompleto estas konservata en la urba biblioteko de Nico. Ĝi traktas pri la Vindiana-teorio de la deveno kaj evoluo de la okcidentaj lingvoj. Stojan finis ĝin en 1951.<sup>20</sup>

Estas malfacile kompili liston de artikoloj kaj verkoj de Petro Stojan, ĉar li kontribuis al multaj periodaĵoj, dum lia migrado tra Eŭropo:

*La Ondo de Esperanto*, Moskvo, 1909-1917; *Esperanta Evoluo*, Grenoble, 1911-1914; *Esperanto*, Geneve, 1905-1920; *Kataluna Esperantisto*, Barcelona, 1926; *Literatura Mondo*, Budapeŝto, 1922-1926; *Literaturo*, Londono, 1919-1925; *Oficiala Gazeto*, Pariso, 1908-1912; *Oficiala Jarlibro*, UEA, 1908; *La Progreso*, Berno, 1918-1923, Praha, 1923-1928.

Malgraŭ la malfacilaĵoj en mezo de la 1980-aj jaroj la unuaj provoj estis prezentitaj por la malvasta fakularo, kompilitaj de *Bernard Golden*<sup>21</sup>. Certe la prezentitaj listoj ne estas kompletaj. Mi provis rekompili esplorinte la fruan periodon de Petro Stojan, kiam li aktive kaj fruktodone laboris en Peterburgo dum 1907-1917. Ankaŭ la nova listo estas kompletigenda, ĉar la verkaĵoj de Stojan estas konservataj sur flaviĝintaj paĝoj de la Esperanta gazetaro.

### **Bibliografio de Petro Evstafjeviĉ Stojan**

(kompilis *A.V. Sidorov*)

“Puti k istine“. (“Vojoj al vero“. Du ĉapitroj pritraktas tutmondan literaturon en atrefaritaj lingvoj), S.-Peterburg, 1908, IV+242 p.

[Lernolibro por rusoj], S.-Peterburg, 1910 (mankas detaloj).

“Ornitologia vortaro oklingva de birdoj Eŭropaj“. Prova litografía eldono de la aŭtoro, S.-Peterburg, 1911, 216 p., 200 ekz.

“Ornitologia vortaro oklingva de birdoj Eŭropaj“. (Latina, franca, angla, germana, itala, pola, rusa, Esperanta; 596 specoj kun 15000 nomoj), S.-Peterburg, 1911, 218 p., 28 x 17 cm.

“Ornitologia vortaro oklingva de birdoj Eŭropaj“. S.-Peterburg, 1911, 216 p., 30 x 20 cm.

[Stojan] Ŝulerc O. “Novyj meĵdunarodnyj jazyk Idido“. El germana lingvo tr. E. P. Nikolajev, S.-Peterburg, 1912, 29 p.

kun Neĵinskij V. “Neobĥodimyja svedenija ob Esperanto“ (“Necesaj scioj pri Esperanto“), S.-Peterburg, 1912, 26 p.

“Karmannij rusko-esperantskij slovarik“ (“Poŝa rusa-Esperanta vortareto“), (5200 vortoj), S.-Peterburg, 1912, 84 p.

“Malyj tolkovyj slovarj russkago jazyka“, ĉastj I (A-O), (“Malgranda klariga vortaro de la rusa lingvo“, parto I. de A ĝis O), S.-Peterburg, 1912, 370 p., 700 ilustr.

“Dopolnenije k Esperanto-russkomu slovarju“ (“Aldono al Esperanta-rusa vortaro“), S.-Peterburg, 1913, 18 p.

---

<sup>20</sup> *Heroldo de Esperanto*, 1961, № 9, p.3.

<sup>21</sup> Golden B. Kontribuaĵo al bibliografio de la publikigitaj verkoj de Petro Stojan (1884-1961) // *Informilo por interlingvistoj*, 1985, kajero 7, p.1-5; Golden B. Nepublikigitaj verkoj de Petro Stojan (1884-1961) // *Informilo por interlingvistoj*, 1985, kajero 8, p.1-3; Golden B. Bibliografiaj donitaĵoj rilate verkojn pri Petro Stojan // *Informilo por interlingvistoj*, 1986, kajero 11, p.1-4.

- “Malyj tolkovyj slovarj russkogo jazyka“ (“Malgranda klariga vortaro de la rusa lingvo“), 2-a eld., S.-Peterburg, 1913, 764 p., (1300 ilustr., 42000 de rusaj, slavonaj, arkaikaj kaj pruntitaj vortoj).
- kun Neĵinskij V. “Neobĥodimyja svedenija ob Esperanto“ (“Necesaj scioj pri Esperanto“), 2-a eld. korektita kaj kompletigita, S.-Peterburg, 1913, 24 p.
- “U.S.E. Universala Slipa Enciklopedio. 1) Slipa enciklopedio kaj ĝia estonteco; 2) Kinematika teorio pri la tempo; 3) Internacia transskribo de propraj nomoj; 4) Himno esperantista “La Espero””, Moskva, 1913.
- kun Ĉupovskij D. “Tutslava lingvo“, S.-Peterburg, 1913-1916 (mankas detaloj).
- “Slavjanstvo i Esperanto“ (“Slavaro kaj Esperanto“), Saratov, 1914, 11 p.
- “Esperanto pered sudom professora“ (“Esperanto antaŭ tribunalo de profesoro“), Saratov, 1914, 12 p.
- “Jazykoznanije i Esperanto“ (“Lingvoscienco kaj Esperanto“), Saratov, 1914, 11 p.
- “Karmannij russko-esperantskij slovarik“ (“Poŝa rusa-Esperanta vortareto“), 2-a eld., S.-Peterburg, 1914, 112 p.
- Abezgus M. “Kraljeviĉ Marko. Tri renkontoj“, 1897, 15 p. (“Marko Koroleviĉ. Tri vstreĉi“), En la rusan trad. Stojan P.), S.-Peterburg, 1914, 24 p.
- “Novaja russkaja ortografija“ (“Nova ortografio de rusa lingvo“), S.-Peterburg, 1914.
- “Malyj tolkovyj slovarj russkogo jazyka“ (“Malgranda klariga vortaro de la rusa lingvo“), 3-a eld., Petrograd, 1916, 743 p., 1300 ilustr.
- “Cent libroj Esperantaj“, 1923
- “Katalogo de lingvoj naturaj, popolaj, literaturaj, klasikaj kaj artefaritaj“, 1927, 20 p.
- “Bibliografio de internacia lingvo. Historia sistema katalogo de filologia, lingvistika kaj poliglota literaturo pri universala alfabeto, filozofia gramatiko, signaro, gestlingvo, pazigrafio, internacia helpa lingvo kaj logistiko“. Ellaboris kaj komentis P. E. Stojan, Genève: UEA, 1929, 560 p.; (Rimarko de la redaktoro: Aperis represo kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. Hildesheim-New York: Georg Olms, 1973, ISBN 3 487 04660 1).
- Krishnamurti J. “Sperto kaj konduto“ (trad. Stojan P.), 1932, 22 p.
- “Antikva strukturo de la lingvo Vindiana“, Yamashiro, Japanio, 1938, 21 p.
- “Vindiana berceau de nos aïeux“ (“Vindiano lulilo de niaj prapatroj“), 1946.
- “Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto“, Brugge, 1953, 110 p.
- “Al geozofio per abicelo“, 1954
- “Stojan-a Testamento“, 1956 - dediĉita al D-ro W.Solzbacher (manuskripto).
- “Vindiana Teorio“, 1958 (manuskripto).
- “Abicelĉaro. Kubika Aboco“, 1958 (manuskripto).
- “Bibliografio de internacia lingvo“, 2-a eld. New York: Hildesheim, 1973, 560 p.
- “Porijeklo i zivot jezika Esperanta“ (“Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto“). (Trad. el Esperanto en la kroatan Josip Pleadin), 1983.
- “Vindoj kaj dagoj“, 1991 (postmorte).

## Artikolaro de P. Stojan

- “Serba ekskurso. Impresoj” // *La Ondo de Esperanto (=LOdE)*, 1912, № 7, p.129.
- kun Zajcev A., “Vera okazintaĵo” // *LOdE*, 1912, № 7, p.130.
- “† V.V.Neĵinskij. Nekrologo” // *LOdE*, 1913, № 8-9, p.134.
- “Esperanto en interslava korespondado” // *LOdE*, 1914, № 4, p.82.
- “Kiom da vortoj enhavas lingvo?” // *LOdE*, 1914, № 6, p.112.
- “Vojaĝaj notoj” // *LOdE*, 1915, № 11, p.140; 1915, № 12, p.155-156.
- “La nekroforoj” // *Esperanto Triumfonta*, N 89, 18.06.1922.
- “Enigmoj por niaj infanoj” // *Literatura Mondo*, 1923, № 12, p.245.
- “La serpentisto. Novelo” // *Literaturo*, 1925, № 25.
- “La serpentisto. Novelo” // *International Language*, 1927, № 9.

- [Stojan P.] O.D.Ribaulb. "Rememoraĵoj pri la unua tempo de Esperanto" // *La Progreso*, 1927, № 1-2, 3, 4-5, 6, 8.
- "Edziĝo en la jaro 1999. Fantazia skizo pri estonteco" // "Internacia Legolibro: Diverslandaj aŭtoroj", 1930, p.56-65.
- "Mia juneco kaj Esperantistiĝo" // *Heroldo de Esperanto*, 1962, № 1329.
- "28 kaj Esperanto" // *La Gazeto*, 1996, N 65, p.5.
- "Rememoraĵoj pri la unua tempo de Esperanto" // *LOdE*, 2009, № 5-6 (175-176), p.19-21; (fino de la artikolo) № 8-9 (178-179), p.19-21.

## 2 Interlingvistikaj artikoloj en *grkg/Humankybernetik*

*Věra Barandovská-Frank*

La kvaronjara, originale germanlingvan revuon „Grundlagenstudien aus Humankybernetik und Geisteswissenschaft“ (t.e. „Bazaj studoj pri humankibernetiko kaj mensosciencoj“, mallongige „grkg/Humankybernetik“) en la jaro 1960 fondis *Max Bense*, *Gerhard Eichhorn* kaj *Helmar Frank* en la Teknika Universitato Stuttgart. Al la temaro apartenis i.a. informaciteorio, kodigo-teorio, aŭtomatig-teorio, informaci-psikologio, informaci-estetiko, lingvo-kibernetiko, inĝenier-kibernetiko, bio-kibernetiko, model-teorio, kibernetika pedagogio, historio de kibernetiko kaj semiotiko. En la sepdekaj jaroj venis moda ondo de programita instruado, aŭtomata vortanalizo, formaligo de lern-nocioj, lern-algoritmoj, esploroj pri lern-sukceso kaj instru-diagramoj.

Kiel objekto de tiuj ĉi esploroj estis uzata ankaŭ Esperanto, precipe en la eksperimento kun lingvo-orientiga instruado, kiun iniciatis la ĉefredaktoro *Helmar Frank* (la redakcio transiris kun li al Berlino kaj laste al Paderborn). Krom tio ekde 1975 la revuo eksperimente publikigis resumojn de ĉiuj artikoloj en diversaj planlingvoj, inter kiuj Esperanto montriĝis la plej sukcesa. En 1982 ĝi iĝis kroma publikaĵ-lingvo kune kun la Franca kaj la Angla, oficialaj lingvoj de la Internacia Kibernetika Asocio.

Jen la kronologia listo de artikoloj, kiuj iamaniere koncernas interlingvistikon, precipe lingvo-modeligon – lingvo-planadon rilate al homaj lingvoj, lingvo-politikon k.s., kaj krome uzadon de Esperanto (ĉefe lingvo-kibernetike). Indikoj: 1974(jaro), /15 (jarvolumo), /4(kajero): 124-126 (paĝoj).

### 1962

*Helmut Henkel*: Automatische Übersetzung und Sprache (Aŭtomata traduko kaj lingvo), 1962/3/3: 65-74

*Gerhard Frey*: Die Logik der Tabu-Sprachen (Logiko de tabuaj lingvoj), 1962/3/4: 119-128

### 1963

*Klaus Baumgärtner*: Aufbau einer Chomsky-Grammatik (Konstruo de Chomsky-gramatiko), 1963/4/3-4: 113-126

### 1967

*Peter Kümmel*: Ideografie – Funktion des sichtbaren Ausdrucks (Ideografio – funkcio de videbla esprimo), 1967/8/2: 63-66

### 1968

*Peter Kümmel*: Han-Zeichen ohne ideographische Funktion (Han-signoj sen ideografia funkcio), 1968/9/2: 48-58

### 1970

*W.W. Schumacher*: Versuch einer Modellierung des sprachlichen Entwicklungsprozesses (Provo modeli lingvan evoluprocezon), 1970/11/1: 31-32

## 1971

*W.W. Schumacher*: Anpassung und Angleichung im sprachlichen Entwicklungsprozess (Adaptiĝo kaj asimiliĝo en lingva evoluprocezo), 1971/12/2-3: 43-46

## 1973

*W.W. Schumacher*: Die Entwicklung des Afrikaans – ein Anpassungsvorgang (Evoluo de la Afikansa – adaptiga procezo), 1973/14/1: 33-34

## 1974

*Helmar Frank*: Meinungsumfrage über Sprachpolitik und Plansprachen (Opini-enketo pri lingvopolitiko kaj planlingvoj), 1974/15/4: 124-126

## 1975

*Guido Dignas*: Das Kommunikationsproblem und die Plansprachen (Komunikadproblemo kaj planlingvoj), 1975/16/1: 1-8

## 1976

*Max Mangold*: Kriterien der absoluten und der relativen Schwierigkeit der Sprachen (Kriterioj de absoluta kaj relativa malfacileco de lingvoj), 1976/17/2: 33-38

*Helmar Frank, István Szerdahelyi*: Zur pädagogischen Bestimmung relativer Schwierigkeiten verschiedener Sprachen (Pri pedagogia determino de relativaj malfacilecoj de diversaj lingvoj), 1976/17/2: 39-44

*Andreas Keil, Barbara Städtler*: Entwurf einer gesamteuropäischen Sprache (Propono pri tuteŭropa lingvo), 1976/17/2: 61-63

*Tazio Carlevaro*: Philosophiegeschichtliche Wurzeln und tiefenpsychologische Gründe des Plansprachenstreits (1907-1913) (Filozofihistoriaj radikoj kaj profundpsikologiaj kialoj de planlingva disputo 1907-1913), 1976/17/4: 97-108

*Helmar Frank*: Zur relativen Lernleichtigkeit einiger Sprachen (Pri relativa lernfacileco de kelkaj lingvoj), 1976/17/4: 120-124

## 1977

*M.T. Mas, M.J. Vigneron, M. Lamotte*: Anwendung eines Verfahrens zur automatischen Spracherkennung auf isolierte Wörter (Apliko de procedo pri aŭtomata lingvorekono al izolitaj vortoj), 1977/18/4: 97-104

## 1978

*Gerhard Kalckhoff*: Eine vergleichende Darstellung der Erlernbarkeit von Sprachen (Kompara prezento de ellernebleco de lingvoj), 1978/19/2: 55-60

*Helmar Frank*: Relative Sprachknappheit und Übersetzungsexzeß (Relativa lingvokonkizeco kaj traduktransaĵo), 1978/19/4: 105-112

## 1979

*Helmar Frank, Evelyn Geisler, Brigitte S. Meder*: Nachweise des strukturbedingten Transfers aus dem Sprachorientierungsunterricht (Pruvoj de strukturkondiĉita transfero el lingvoorientiga instruado), 1979/20/1: 1-13

*Vladimir Mužič*: Notiz über relative Textlängen bei Knapptextübersetzungen (Rimarko pri relativaj tekstlongecoj ĉe tradukoj de resumoj), 1979/20/1: 29-30

*Bruce Arne Sherwood*: Schnelle textgesteuerte Sprachsynthese-Algorithmen für Esperanto, Spanisch, Italienisch, Russisch und Englisch (Rapidaj tekststirataj lingvoanalizaj algoritmoj por Esperanto, Hispana, Itala, Rusa kaj Angla), 1979/20/4: 109-122

*Sylla M. Chaves*: Überlegungen zur Lernerleichterung im Fremdsprachunterricht durch Vorausstellung der Internacia Lingvo (Konsideroj pri lernfaciligado en instruado de fremdlingvoj per antaŭmeto de Internacia Lingvo), 1979/20/4: 122-130

## 1980

*Yukio Fukuda*: Zur rationalisierten Fremdsprach-Lehrplanung unter Berücksichtigung der (z.B. deutschen oder japanischen) Muttersprache (Pri raciigita planado de fremdlingvo-instruado



sub konsidero de – ekz. germana aŭ japana – gepatra lingvo), 1980/21/1: 1-16  
*Evelyn Geisler*: Zur Quantitativen Bestimmung des Transfers vom ILo-Unterricht auf das Englischlernen (Pri kvanta determino de transfero de ILo-instruado al la lernado de la Angla), 1980/21/3: 93-98

#### 1981

*Jonathan Pool*: Sprachliche Gleichheit, sprachliche Ungleichheit und Sprachdiskriminierung: Begriffe und Messung (Lingva egaleco, lingva malegaleco kaj lingvodiskriminado: nocioj kaj mezurado), 1981/22/3: 69-82

#### 1982

*Zlatko Tišljarić*: Pri la morfemfrekvencaro en la parolata Internacia Lingvo, 1982/23/1: 40-47  
*M.T. Janot-Giorgetti, M. Lamotte*: Système de reconnaissance automatique des fautes de prononciation (Aŭtomata rekonsistemo por prononceraroj), 1982/1: 81-89  
*Takashi Sakaguchi*: Nova prezento de japana lingvo en bildoj – la lingva aspekto laŭ grafikaĵoj, 1982/23/4: 158-160

#### 1983

*Heinz Dieter Maas*: Nova datenostrukturo por maŝina traduko, 1983/24/1: 31-37  
*Jochen Sotschek*: Zählungen zur Phonemhäufigkeitsverteilung des Esperanto (Nombrado pri fonemofteco de Esperanto), 1983/24/4: 155-163

#### 1984

*Helmar Frank*: Zur Optimierung der Zeitverteilung bei Transferwirkung durch Lehrstoffmodelle (Pri la optimumigo de la tempodistribuo baze de lernplifaciligado per instruajmodeloj), 1984/25/1: 3-14  
*Luis Mimo Espinalt*: Kia oni planas verban sistemon por konstruota lingvo?, 1984/25/4: 151-156

#### 1985

*Richard Schulz*: Noto pri la scienceco de la Internacia lingvo, 1985/26/1: 31-38  
*Helmar Frank*: Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik (Cele kibernetikan pravigon de aksioma interlingvistiko), 1985/26/2: 71-82  
*Herbert Stachowiak*: Methodologische Bemerkungen zur Axiomatisierung der Interlinguistik (Metodologiaj rimarkoj pri aksiomigo de interlingvistiko), 1985/26/2: 83-85  
*Lothar Hoffmann*: Informations-Transfer per SPRACHE 2000. Anwendung und automatische Übersetzung in mehrere Sprachen (Inform-transigo pere de SPRACHE 2000. Apliko kaj aŭtomata traduko en plurajn lingvojn), 1985/26/3: 121-129  
*Richard Schulz*: Notoj pri la aksiomado de la Internacia lingvo, 1985/26/3: 130  
*Ouyang Wendao*: Enkonduko de 5-dimensia modelo de ĉin-lingva informo kaj algoritmaj studoj pri vort-identigo, fraz-analizo kaj semantika prezentado, 1985/26/3: 131-139

#### 1986

*Herbert Stachowiak*: Gedanken zu einer pragmatischen Theorie der Interlinguistik (Pensoj pri pragmata teorio de interlingvistiko), 1986/27/1: 3-12  
*Li Wie*: Aŭtomata tradukado el la Internacia en la ĉinan kaj anglan lingvojn, 1986/27/4: 147-152  
*Helmar Frank*: Übersetzungsuntreue und Referenzsprache (Tradukmalfidindeco kaj referenclingvo), 1986/27/4: 177-183

#### 1987

*Zhao Xiaobao*: Konsideroj pri generado de ĉinaj ideogramoj, 1987/28/2: 77-79  
*Werner Strombach*: Informacio kaj lingvo, 1987/28/4: 155-160

#### 1988

*Qiao Yi*: Kompara esploro de kazomarkoj kaj ĉinlingvaj leksemkazaj rimedoj, 1988/29/3: 115-121

## 1989

*Carlo Minnaja*: Modeloj pri ekspertaj sistemoj por la procezado de natura lingvaĵo, 1989/30/1: 3-11

*Qiao Yi*: La ĉenotransfero por maŝintradukado, 1989/30/2: 59-64

*Elisabetta Formaggio*: Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado, 1989/30/4: 141-151

## 1990

*Karl-Ernst Paech*: Noto pri fruaj interlingvistikaj eksperimentoj en München 1990/31/1: 29-30

*Helmar Frank*: Rechtfertigung von Rechner- und Sprachmodellle durch die kybernetische Tranfertheorie (Legitimado de modeloj de komputiloj kaj lingvoj per la kibernetika teorio pri lernplifaciligado), 1990/31/3: 100-108

*Věra Barandovská*: Internacia scienca akademio kaj internacia lingvo – projektoparo de Jan Amos Komenský 1990/31/4: 155-158

## 1991

*Věra Barandovská*: IALA, 1991/32/2: 76-83

*Dan Maxwell*: La lingvikaj aplikoj de kibernetiko, 1991/32/3 : 115-124

*Günter Lobin, Li Renzhi*: Fallstudien zum Sprachorientierungsunterricht mit zwei chinesischen Testpersonen (Kazostudoj pri lingvoorientiga instruado kun du ĉinaj testpersonoj), 1991/32/3: 141-145

*Helmar Frank*: Notiz zur Rentabilität sprachlicher Vorschaltkurse zu Fachkursen (Noto pri la rentabilitato de lingvaj preparkursoj al fakkursoj), 1991/32/4: 177-181

*Helmar Frank, Yashovardan, Věra Barandovská*: Kiel utile difini la nocion “interlingvistiko”?, 1991/32/4: 182-190

## 1992

*Werner Bormann*: Evoluinta kompreno de interlingvistiko 1992/33/1: 3-8

*Helmar Frank, Miloš Lánský*: Eine rechnerunterstützte Wortbildungsgrammatik auf der Grundlage der Ideen von Komenský, Zamenhof und de Saussure (Komputile bazita gramatiko de vortfarado surbaze de ideoj de Komenský, Zamenhof kaj de Saussure), 1992/33/1: 7-19

*Helmut Welger*: Mallonga enkonduko en la konstitucian juron de ILo, 1992/33/1: 32-40

*Helmut Welger*: Kelkaj lingvojuristaj ekspertizoj, 1992/33/2: 59-64

*Dan Maxwell*: Ekinteresiĝo pri planlingvoj en Usono 1992/33/4: 147-150

*Helmar Frank, Elisabetta Formaggio*: La profito el propedeŭtika (speciale lingvo-orientiga) instruado depende de aĝo kaj transfero, 1992/33/4: 164-174

## 1993

*Dan Maxwell*: La esenca sameco de komuniga kaj dependiga gramatikoj, 1993/34/1:34-43

*Věra Barandovská-Frank*: Noto pri planlingvistikaj kriterioj kaj latina influo, 1993/34/2: 89-92

*Věra Barandovská-Frank*: Lingvistikaj meritoj de matematikisto: Giuseppe Peano kaj Latino sine flexione, 1993/34/3: 119-124

## 1994

*Věra Barandovská, Helmar Frank*: Instrulingvo kaj lernsukceso, 1994/35/2: 59-71

*Tilo Frank*: Rechnergraphische Optimierung und Bestimmung der Legitimierbarkeitsgrenzen des Zeitaufwands lernfördernder Kurse (Komputilgrafika optimumigo kaj determino de la limoj de legitimeblo de la tempodaŭro de lernplifaciligaj antaŭkursoj), 1994/35/2: 72-81

*Claus J. Günkel*: Zur optimalen Dauer des Sprachorientierungsunterrichts (Pri optimuma daŭro de lingvoorientiga instruado), 1994/35/2: 82-85

*Helmar Frank*: Am Rande von Bildungskybernetik und Interlinguistik (Periferie de klerigkibernetiko kaj interlingvistiko), 1994/35/3: 135-143

*Helmar Frank*: Programmatische Notiz zur Interlinguistik als akademische Disziplin (Programeca noto pri interlingvistiko kiel universitateca fako), 1994/35/4: 153-160

*Hiroshi Katsumori*: Esperanta terminaro pri scienco por maŝintradukado kun Esperanto kiel pontolingvo, 1994/35/4: 161-169

### 1995

*Quiao Yi*: Interlingvistika modeligo orientiganta fontolingvaĵon, 1995/36/2: 73-79

*Ines Ute Frank*: Noto pri la lingvo-orientiga instruado okazinta en la elementa lernejo de Oberndorf/Neckar, 1995/36/3: 118-119

*Reinhard Selten, Jonathan Pool*: Symmetric Equilibria in Linguistic Games – Essentials of “Enkonduko en la Teorion de Lingvaj Ludoj” (Simetria ekvilibraĵoj en lingvoludoj – esencaĵo de “Enkonduko...”), 1995/36/4: 179-184

### 1996

*Věra Barandovská-Frank*: Ekzempla mezurado de lernprogresoj okaze de lernado de vokabloj, 1996/37/1: 11-15

*Věra Barandovská-Frank*: “Versus Interlinguistica” /Aus der Geschichte der Interlinguistik (El la historio de interlingvistiko), 1996/37/2: 71-82

*Werner Bormann*: Planlingvo kiel la 12-a traktatlingvo, 1996/37/3: 111-118

### 1997

*Quiao Yi*: La semiotika principo de la Iĝing diagramoj, 1997/38/2: 61-68

### 1998

*Jonathan Pool*: Optimal Language regime for the European Union (Optimuma lingva reĝimo por la Eŭropa Unio), 1998/39/1: 3-19

*Zlatko Tišljar*: Lingvo-Orientiga Instruado (LOI) cele al rapidigo de la lernado de fremdlingvoj. Sloven-kroata-aŭstra eksperimento 1993-1995., 1998/39/1: 28-35

*Helmar Frank, Věra Barandovská*: Machbare Mehrsprachigkeit in Europa und in der wissenschaftlichen Welt/Farebla plurlingveco en Eŭropo kaj en la scienca mondo, 1998/39/1: 36-40

*Harald Weydt*: Welche Sprachen in den europäischen Institutionen? (Kiujn lingvojn en la eŭropaj institucioj?), 1998/39/2: 69-80

*Leonid N. Myasnikov*: Tra ruslandaj enciklopedioj, 1998/39/3: 123-131

### 1999

*Liu Haitao*: Aplikata interlingvistiko, 1999/40/1: 31-41

*Helmut Welger*: Setzung, Konkretisierung und Gewichtung plansprachlichen Güterkriterien bei Zamenhof (Starigo, konkretigo kaj pesigo de planlingvaj kvalitekriterioj ĉe Zamenhof), 1999/40/2: 69-83

*Ulrich Ammon*: Die wichtigsten Sprachen in Europa und die Europäische Union (La plej gravaj lingvoj en Eŭropo kaj Eŭropa Unio), 1999/40/4: 147-159

*Liu Haitao*: La kalkulado de la lingvo – vide el interlingvistiko, 1999/40/4: 160-170

### 2000

*Helmut Welger*: Pri la senco de verbaj finaĵoj aŭ: Dumnokte la rektoro ne rektoras, 2000/41/1: 42-43

*Carlo Minnaja*: Statistika analizo de paroladoj de Ivo Lapenna, 2000/41/2: 83-90

*Helmar Frank*: Ansatz zu einer interlinguistischen Sprachaxiomatik für Fremdsprachenpropädeutik und Eurolinguistik (Aliĝo al interlingvistika lingvo-aksiomiko pro fremdlingvo-propedeŭtiko kaj eŭrolingvistiko), 2000/41/3: 99-118

*Huang Yani, Claus Günkel*: Transfer-efiko de ILo sur la anglan depende de la gepatra lingvo – konkrete okaze de la ĉina, germana kaj franca, 2000/41/3: 139-142

### 2001

*Věra Barandovská-Frank*: Eŭropaj lingvoj kaj interlingvoj, 2001/42/4: 155-165

*Kinga D. Erzse*: Schwierigkeiten beim Erfüllen von Franks Forderung einer Modellreihen-Entwicklung europäischer Sprachen durch Kontrastieren mit ILo (Malfacilaĵoj dum plenumado de la postulo de Frank, evoluigi eŭropajn lingvojn kontraste al ILo en modelseriojn), 2001/42/1: 20-28

## 2002

*Alan Delmotte*: Europanto – ĉu ŝerco aŭ eŭropa tendenco? 2002/43/1: 20-36

*Kinga D. Erzse*: Zur Gegenstand- und Zielpräzisierung der Eurolinguistik (Pri precizigo de la objekto kaj celo de eŭrolinguistiko), 2002/43/2: 71-81

*Bradío V. Moro*: La interlingvistika penso de Janus di Censo 2002/43/3: 107-114

*Carlo Minnaja, Laura C. Paccagnella*: Anaphora with relative Pronouns: an Algorithm for Italian and Esperanto (anaforo kun rilataj pronomoj: algoritmo por la Itala kaj por Esperanto), 2002/43/2: 51-61, 2002/43/3: 115-124

*Maria Cristina Tanc*: Elementaj problemoj kun la prepoziciaj aksiomoj plenumante la Sibian Programon por la lingvoj franca, germana, hispana kaj rumana, 2002/43/4: 167-174

*Helmar Frank*: Zur Lehrplanung für ein Fach Eurologie – oder: Europik (Pri la kursplanado por fako Eŭrologio – aŭ: Eŭropiko), 2002/43/4: 175-190

## 2003

*Jitka Skalická*: Interlingvistikaj nocioj en ĉefaj enciklopedioj, 2003/44/2: 73-81

*Věra Barandovská-Frank*: Gehören Plansprachen zur Sprachplanung (Ĉu planlingvoj apartenas al lingvoplanado?), 2003/44/2: 88-99

*Maria Cristina Tanc*: Pri la vortprovizo taŭga por lerneja instruado de eŭrolinguistiko 2003/44/4: 207-212

## 2004

*Ana Vrajitoru*: La lernado de ILo kompare kun la lernado de dua lingvo etna, 2004/45/1: 8-13

*Richard Hable*: Psikologiaj trajtoj de okupiĝo pri planlingvoj, 2004/45/1: 14-19

*Maria Cristina Tanc*: Karakterizo kaj stato de la Sibiana Programo kontraste elvolvi la eŭropiajn lingvojn en modelserioj /Kennzeichnung und Stand des Hermannstädter Programms zur kontrastiven Modellreihen-Entwicklung der europäischen Sprachen, 2004/45/3: 124-133

*Věra Barandovská*: Zur Typologie und Charakteristika der Universalsprachen (Pri tipologio kaj karakterizaĵoj de universalaj lingvoj), 2004/45/3: 134-144

*Liu Haitao*: La lingvistikaj konceptoj de Zamenhof, 2004/45/4: 155-165

## 2005

*Richard Hable*: Loglan kaj Lojban, 2005/46/1: 13-19

*Reinhard Selten*: La estonteco de Eŭropo kaj Esperanto, 2005/46/2: 82-89

*Helmar Frank*: Eine sprachneutralische Argumentationskette/Lingvoneŭtraleca argumentadĉeno, 2005/46/2: 90-102

*Helmar Frank*: Eurolinguistik und Eurolinguismus (Eŭrolinguistiko kaj eŭrolingvismo), 2005/46/4: 159-177

*Ana Vrajitoru*: Analizo de la unua aksiomo de ELo kompare kun iuj eŭropiaj lingvoj, 2005/46/4: 188-196

## 2006

*Helmar Frank*: Verständigungspotential und Sprachlastenausgleich – mögliche Perspektiven europäischer Sprachpolitik (Interkompreniĝpotencialo kaj kompensado de lingvo-kostoj – eblaj perspektivoj de eŭropia lingvopolitiko), 2006/47/1: 3-19

*Cyril Brosch*: La klingona lingvo el tipologia vidpunkto, 2006/47/2: 69-74

*Věra Barandovská-Frank*: Revuo Kosmoglot en interlingvistika fono, 2006/47/4: 197-204

*Slavko Samotorčan*: Robert Phillipson: Ĉu nur angla Eŭropo? Recenzo, 2006/47/4: 205-208

## 2007

*Carlo Minnaja*: Leteroj de du interlingvistoj en la komenco de la dudeka jarcento, 2007/48/1: 15-20

*Věra Barandovská-Frank*: Rolo de Cosmoglotta por la stabiligo de Occidental, 2007/48/2: 80- 92

*Věra Barandovská-Frank*: Cosmoglotta survoje de Occidental al Interlingue, 2007/48/3: 123- 138

## 2008

*Günter Lobin*: Zur Entstehung des Projekts Sprachorientierungsunterricht (Pri ekesto de la projekto de lingvoorientiga instruado), 2008/49/1: 41

*Helmar Frank*: Das Paderborner Experiment zum SpOU /La paderborna eksperimento pri LOI, 2008/49/1: 42-52

*Helmar Frank*: Kernforderungen einer europäischen Sprachpolitik /Kernpostuloj de eŭropa lingvopolitiko, 2008/49/1: 59-60

*Věra Barandovská-Frank*: Cosmoglotta kaj Interlingue, 2008/49/2: 98-111

*Denis Silagi, Věra Barandovská-Frank*: Oმაგე de centjariĝo de verko en Latino sine flexione, 2008/49/3: 158-160

## 2009

*Věra Barandovská-Frank*: Kvin jardekoj de Interlingua laŭ spertoj de Ingvar Stenström. Recenzo, 2009/50/2: 122-123

*Věra Barandovská-Frank*: Interreta lingvokreado kaj interlingvistiko, 2009/50/3: 151-168

*Věra Barandovská-Frank*: Bonvena kontribuado al historio de interlingvistiko kaj matematiko. Recenzo, 2009/50/3: 169-170

*Sean Healy*: Conlangs, 2009/50/4: 190-194

## 3 Interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj

### 3.1 Altlernejaj studofinaj disertacioj

*Bem, Sylwia* (2008): Bibliografia książka esperanckiej za lata 1989-2007. Analiza porównawcza. (Licenca disertacio), Katowice: Uniwersytet śląski wydział filologiczny instytut bibliotekoznawstwa i informacji naukowej. 54 p. ([https://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p\\_666c5k3b9cn](https://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p_666c5k3b9cn) )

(Klarigo de la aŭtorino: La laboraĵo estas bibliografio de la esperanta libro en la jaroj 1989-2007, bazita sur la publikaĵoj menciitaj en la Przewodnik Bibliograficzny [Bibliografia gvidlibro] en la sama periodo. Karakterizo de la elementoj de la bibliografiaj priskriboj estis uzita kiel esplormaterialo, komparita en la sekva parto de la verko al la listo koncernanta la jarojn 1945-1979. La celo de la laboraĵo estas konsciigo de la leganto pri funkciado de la esperanta libro en la pola eldonmerkato kaj alproksimigo al li de la koncerna problemaro.)

*Dall'Olio, Anna Maria* (2003/04): Osservazioni sulla storia e sulla struttura dell'esperanto con particolare riferimento alla lingua italiana. Pisa: Università degli studi di Pisa, Facoltà 'di lettere e filosofia, 98 p. ([adallolio59@hotmail.com](mailto:adallolio59@hotmail.com) )

*Galantucci, Gabriella* (2008/09): Lingue pianificate e terminologia nell'opera di Eugen Wüster. Torino: Università degli Studi di Torino, Facoltà di Lingue e Letterature Straniere. 82 p. + Dokumentaro (Master-Arbeit) (<http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#700> )

*Gubbins, Paul Philip* (2003): Ĝis Revido: Development of a beginners' video course in the international language Esperanto. A dissertation submitted in part fulfilment of the requirements for the degree of M.Ed. Educational Technology and ELT. Manchester: University of Manchester, Faculty of Education. 110 p.

*Krijnen, Lotte* (2008): Pardonu min - Het gebruik van beleefdheidsstrategieën in het Esperanto. Universiteit van Amsterdam: Faculteit der Geesteswetenschappen, finlaboraĵo por por bakalaŭreco, 33 p.

*Tellier, Angela* (2009): The stability of language learning aptitude in primary school children. Dissertation: Master of Arts, Department of Language and Linguistics, University of Essex. 66p + 70p.

(Klarigo de la aŭtorino: La disertacio enfokusigas al lingvolerna kapablo [language aptitude] kaj esploras, interalie, la stabilecon de la diversaj elementoj de lingvolerna kapablo ĉe infanoj 8-9-jaraĝaj lernantaj duan lingvon (aŭ la francan aŭ Esperanton) en ŝtata bazlernejo en Anglio. Aldone, ĝi esploras la rilaton inter tri variabloj: lingvolerna kapablo, lingva kapablo [language proficiency] kaj metalingva konscio [metalinguistic awareness]).

### **3.2 Diplomalaboraĵoj de la Internaciaj Interlingvistikaj Kursoj en la Adam-Mickiewicz-Universitāt Poznań**

*Delmotte, Alain* (2006): Analizo de la vortoprovizo de kvar lernolibroj. Poznań: Adam-Mickiewicz-Universitato. Internaciaj Interlingvistikaj Kursoj, 62 p.  
<http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#700>

*Jausions, Anne* (2008): La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj Esperanto-parolantoj. Poznań: Adam-Mickiewicz-Universitato. Internaciaj Interlingvistikaj Kursoj, 59 p.

### **3.3 Statistiko pri kursoj en altlernejoj**

*Germain Pirlot* denove kompilis superrigardon pri Esperanto-kursoj kaj prelegaroj en universitatoj kaj altlernejoj. Jen la resumo:

**Nombro laŭlande:** Brazilo: 5, Bulgario: 1, Ĉeĥio: 1, Ĉinio: 15, Germanio: 3, Francio: 1, Hispanio:1, Italio:1, Japanio: 2, Kongo Dem.Resp.: 1, Korea Resp.: 3, Kostariko: 1 - Litovio: 2, Meksiko: 1, Nederlando:1, Pollando: 4, Rusio: 4, Slovenio:1, Svedio: 1, Usono : 3, Venezuelo : 2  
=> **sume : Kursoj: 54, Landoj: 21**

Vi povas kompari kun la antaŭaj kompiladoj [landoj-kursoj]

2002 : nov. [20-43]

2004 : febr. [23-63]

2006 : jan. [26-75]

2008 : jan. [24-68]

(La kompletan liston vidu sub: <http://www.egalite.fw.hu/listo/listindex.htm>)

### **3.4 Interlingvistiko por filozofoj ĉe Universitato de Milano**

*Federico Gobbo*

La 15-an de Decembro 2009, ĝuste la librotagon, finiĝis la unua laboratorio pri Interlingvistiko por studentoj de filozofio ĉe la Universitato de Milano, Italujo. Laŭ propono de profesoro *Paolo Valore*, kiu regas la katedron pri Historio de la Nuntempa Metafiziko, *Federico Gobbo* (Universitato de Insubrio Varese-Como) gvidis la laboratorion kiu celis prezenti la historiajn kaj filozofiajn bazojn de Interlingvistiko, kun speciala atento al Esperantologio. La laboratorio konsistis el 10 renkontiĝoj kaj daŭris entute 20 horojn, por validi 3 kreditunuojn. En la 10 renkontiĝoj la studentojn oni devigis partopreni aktive dum ĉiu

unua kaj dua horoj. Krome oni klopodis starigi ĝemeladon kun la klaso de la kurso Interlingvistiek ĉe Universito de Amsterdamo (Uva), docento *prof. Wim Jansen*, por ebligi la nederlandajn kaj italajn studentojn uzi skribe la lingvon en kontrolita medio. Tiu eksperimento bedaŭrinde ne sukcesis, ĉar la nederlandaj studentoj ne aliĝis al la gugla grupo nomita AMIK-o (Amsterdama Milana Interlingvistika Klubo), atingebla je la porĉiama adreso <http://bit.ly/amik-o> (konsideru, ke ĝi estas laŭinvita grupo nur por la studentoj). Efektive la virtualejo funkciis nur por kundividi interesajn materialojn. La unuaj horoj dediĉitis al la parto interlingvistika – kiu estis klarigita itallingve, dum la duaj horoj de la parto estis pli praktikaj kaj fokusitaj al Esperanto – kiel lingvo, fenomeno kaj kulturo.

### **Interlingvistika parto**

En la interlingvistika parto oni klarigis la ĉefajn principojn de lingvoplanado aplike al la studkazoj de la helplingvoj, kiel la rilato inter lingvo kaj identeco, la distingo inter statuso- kaj korpuso-planado kaj la ĉefajn fakterminojn kiel ekzemple “Ausbausprache” (ellaborita lingvo) kaj “Dachsprache” (tegmentolingvo). Post klarigo de la rilato inter lingvoplanado kaj lingvopolitiko, kun speciala atento al la studkazo de EU, oni ŝanĝis vidpunkton. Fakte, ekde la historia perspektivo la studentoj lernis la ĉefajn momentojn de interlingvistiko, komencante de la ideoj pri “characteristica universalis” kaj “lingua generalis” fare de Leibniz kaj la ideoj de Descartes esprimitaj en fama letero al *Mersenne*. Poste la atento venis al la historio de la plej gravaj modernaj planlingvoj komencante de Volapuko kaj Esperanto, por iri al la lastjarcentaj Latino sine Flexione, Ido, Basic English, Novial, Occidental/Interlingue kaj IALA/Interlingua. Teoriojn de *Louis Couturat*, *René de Saussure*, *Otto Jespersen*, influon de la hipotezo *Sapir-Whorf* al *Alexander Gode* oni vigle diskutis kune en la klaso, ankaŭ per legado de tekstoj en la diversaj planlingvoj. La programo sekvis plimalpli la strukturon de la tekstolibro fare de *Federico Gobbo* (2009), kun unu grava escepto: por didaktikaj kialoj, la historion de la Esperanto-movado oni klarigis paralele al la historio de la aliaj planlingvoj (pripensu ekzemple la rilaton inter la fondiĝo de UEA kaj la tiel-nomata 'Ido-skismo').

### **Esperantologia parto**

Dum la dua horo la docento parolis esperante ekde la unua leciono. La adoptita lernolibro estis la konata de *Paul Gubbins* (2006), kiu laŭstrukture kaj -enhave bone adaptiĝas al klera publiko de universitataj studentoj (konsideru, ke la plejmulto de la junaj filozofoj plimapi legokapablas la anglan, la francan, la germanan kaj foje la latinan kaj la malnovan grekan). Fakte unuavide la klaso devis laŭtlegi la dialogojn de la ĉapitroj (en du grupoj laŭ sekso) kaj traduki. Kiam io ne rekte diveneblis, la docento klarigis la vorton aŭ la gramatikon esperante, foje donante ekzemplojn en la fontolingvoj – precipe franca, germana, angla, por scipovo, sed atente evitante la italan. Je la kvina leciono oni ne plu tradukis, sed rekte pasis al la ekzercoj, tiel ke la lernantoj ekparolis, unue timide, poste iom pli flue kaj aktive. Je la lastaj lecionoj etaj rolludoj estis proponitaj kaj amuze faritaj de la plej aktiva partoprenantaro. Sed eĉ la mallaboremaj devigatis almenaŭ aŭskulti kio okazis: post 10 horoj ĉiuj povis konstati, ke por kleraj italoj Esperanto estas sufiĉe komprenebla kaj tuj uzebla laŭ volo kaj emo de la homoj. Enkonduko en la kulturon estis rekta kaj ŝtup' al ŝtupa. Por doni ekzemplon, en la lastaj lecionoj la docento aŭdigis ĉapitron de la Infana Raso laŭtlege de *William Auld*, jidan kanton Vilne/Vilno, esperantigitan de *Piero Nissim*, kiuj kortuŝis multajn. Sekvis kultura klarigo pri la fono de la kulturaĵoj, jam enkondukitaj en la unuaj horoj. Alia ekzemplo: por klarigi la debaton pri la neologismoj, la lastan lecionon oni surscenigis 5-mintuan teatraĵon de *Julio Baghy*, *Lingva evoluo*. Ĉiosume, je la fino la studentoj havas ilaron por daŭrigi la studadon de interlingvistiko kaj esperantologio, se ili tion emas fari.

### **Bibliografio**

- Gobbo, Federico (2009). *Fondamenti di interlinguistica ed esperantologia*. Milano: Libreria Cortina.
- Gubbins, Paul (2006). *Kunvojaĝu*. Pisa: Edistudio.

## 4 Duvoluma festlibro por *prof. d-ro So Gilsu*

Okaze de la 65-jariĝo de la korea ekonomikisto *prof. d-ro So Gilsu* aperis festlibro konsistanta el du ampleksaj kaj riĉe ilustritaj volumoj. La universitata profesoro aparte studis la historion de la koreaj mezepoka ekonomio kaj ekonomiaj ideoj. Surbaze de la informoj, ricevitaj de *prof. So Jinsu*, la frato de *prof. So Gilsu*, ni donas kelkajn informojn pri la volumegoj  
Red.

### ***1-a Volumo: Dehanminkuk Dehakgyosu: Universitata profesoro de Korea Respubliko (950 p.)***

Tiu ĉi libro estas la kroniko de 65 jaroj de la vivo de *prof. So Gilsu*. Li rememoras en la libro pri sia lernado dum sia studenta tempo en la universitato sur la paĝoj inter 80-102, 94-102, kaj pri sia partopreno por organizado kaj la movado sur la paĝoj 140-164. Pri liaj verkoj pri Esperanto temas sur la paĝoj 459-461, kaj pri Esperanto kaj lia mondaniĝo sur la paĝoj 652-717. Aliajn partojn li plenigas per tekstoj, kiuj rilatas al lia profesoreco kaj studado pri la antikva historio de Koreio. La libro en sia komenco enhavas ankaŭ gratulajn artaĵojn.

### ***2-a volumo: Malgunnara Saramdul: La homoj en pura lando, eseoj dediĉitaj al la emeritiĝo de profesoro So Gilsu (844 p.)***

Tiu ĉi libro konsistas el 192 eseoj de esperantistoj kaj neesperantistoj. Inter la skribintoj troviĝas la amikoj de elementa, meza, supermeza lernejoj kaj de la universitato, konatoj de la Seokyeong Universitato, kie *So Gilsu* instruis, kaj la socio kaj institutoj de Goguri kaj ekonomiko, kiuj donis al li influon. En la libro krome troviĝas tekstoj de 45 esperantistoj koreaj kaj eksterlandaj, inter ili la Esperantaj geamikoj *Ulrich Lins*, *Renato Corsetti*, *Petro Chrdle* kaj aliaj, kiuj memoris per mesaĝo pri la renkontiĝoj kun la jubileulo. La menciita parto troviĝas inter paĝoj 254 kaj 505, kun tekstoj en Esperanto kaj tradukoj en la korea lingvo. Aldoniĝis multaj fotoj. La rakontoj de la esperantistoj devus esti parto de la Esperanto-movado de Azio kaj la mondo.

## 5 ***Mark Fettes en Parma***

*Paolo Valore*

La 9-an de februaro 2010 *Mark Fettes* de la Universitato Simon Fraser, Vankuvero (Kanado), prelegis ĉe la Internacia Biblioteko “Ilaria Alpi” en Parmao (Italujo) pri la lingva ekologio de la edukado. *Fettes* memorigis pri la taskaro de la ekologiaj sciencoj, kiu estas kompreni kaj karakterizi la reciprokajn interdependajn rilatojn inter la diversaj eroj de ekosistemo, kaj rimarkis ke ni ĉiuj, kiel homoj, estas anoj de lingva ekologio. Ĉiu lingvo estas kompleksa sistemo de rilatoj, sed lingva ekologio ne estas nur *enlingva* afero: la multaj diversaj lingvosistemoj interplektiĝas en pli vastajn sistemojn (*interlingva* ekologio).

La prelego de *Fettes* koncentriĝis pri la aplikado de la lingva (kaj interlingva) ekologio al edukistemo (precipe lernejoj). Tiacele *Fettes* referencis al la priskribo de la socia ekologio de nia epoko de *Zygmunt Bauman*, kiu parolis pri “solida moderneco” rilate al niaj modernaj socioj kiel klopodo venki la malcertecojn de la homa ekzisto. Kaj lernejoj estas grava parto de tiu ŝtata sistemo, tial ke ili enkondukas ĉiujn infanojn en la komunan vivon de la lando. Sekve, la lingvo de la lernejo ĉiam estis grava politika temo: ĝi estas la lingvo de la identeco, la lingvo per kiu oni povas imagi sin plejrajta ano de la nacia kulturo, la literatura kaj ekonomia lingvo.

Tamen en la dua duono de la 20a jarcento la tiel nomata “tutmondiĝo” faciligis la fluon de informoj, mono, homoj, varoj trans landlimojn. Integritaj en pli vasta ekonomia kaj komunika sistemo la diversaj naciaj ŝtatoj estas ĉiam malpli izolitaj kaj aŭtonomaj. Kaj tiu evoluo subtenis ankaŭ evoluon de la pensado: pli ol la nacia identeco tipa de la solida moderneco,



disvastiĝas la ideo pri homaj rajtoj, kiel aro de principoj sendependaj de la decidoj de la ŝtatoj, kvazaŭ iu planeda civitaneco por ĉiuj homoj. Tion Bauman nomis “likva moderneco”; la nova situacio kuntrenas malcertecon: nun oni akceptas, ke multo dependas de homoj kaj institucioj en aliaj landoj, kaj eĉ la internaciaj organizoj ne kapablas ĉion regi. Kaj la malnova sistemo de naciaj lingvoj aspektas pli kiel ĝeno ol kiel solvo, kaj la anglan oni proponas kiel rimedon por esprimi la aspirojn de la likva moderneco. La angla ankaŭ *simblas* la likvan modernecon: en la fantazio de la homoj (kaj malgraŭ ĉiuj kontraŭaj indikoj) ĝi estas malankrita de la angla kulturo, io sennacia, neŭtrala, facile lernebla. Post tio Fettes konsideris la taskon de Esperanto kiel tiu sopirata neŭtrala komunikilo por la likva moderneco. Sed la likva moderneco estas ankoraŭ malfidema pri la utopieco de Esperanto, kiu tro memorigas pri la solidismaj aspiroj de la ŝtatoj.

Finfine Fettes prezentis la lingvajn dilemojn de la nuntempa edukado: la lernejoj, konstruitaj por la plivastigo de la individua libero de la lernantoj *ene de la limoj de la ŝtato* kaj por la kultivado de la nacia identeco de lokdevenaj lernantoj, ŝajnas malnovaj. Fronte al la instruistoj, plejparte reprezentantoj de la nacia solideco, estas ĉiam pli miksitaj gamoj de lernantoj, el ĉiusecaj sociaj kaj kulturaj fonoj. Kaj la krizo sin montras ankaŭ ĉe la lingva flanko: ŝrumpas instruado de aliaj fremdaj lingvoj krom la angla kaj kreskas dubo pri la estonteco de aliaj naciaj lingvoj. Fettes rimarkis ke la nuna ekologia krizo ne estas nur pri akvo, aero, tero, energio aŭ simile; ĝi estas ankaŭ pri kulturo kaj edukado, kaj pri lingva diverseco: la perdo de biologia diverseco paralelas la perdo de lingva diverseco. Fettes pledis por tio, ke esperantistoj, ekologiistoj, indiĝenaj aktivuloj kaj diversaj aliaj grupoj komencu koncepti sin kiel anoj de tria speco de moderneco, “transmoderneco”: temas pri koscia klopodo religi la novajn generaciojn al la kulturoj, historioj, naturaj apartaĵoj de ĉiu loko, tamen komprenante ĝian rolon en pli vastaj fenomenoj de la regiono, la nacio kaj la homaro.

## 6 Novaj eldonaĵoj

### 6.1 La disertacio de LIU Haitao

La konata ĉina interlingvisto, lingvisto kaj informadikisto, prof. d-ro LIU Haitao, ĵus publikigis sian ĉinlingvan doktoran disertacion (kun tamen anglalingva titolo):

*Liu, Haitao (2009). Dependency Grammar: from theory to practice. Beijing: Science Press. ISBN 9787030248664. xxii+319 pp.*

### 6.2 Esperanto en tradukteoria libro de Heidemarie Salevsky

La profesorino pri tradukscienco *prof. dr. Heidemarie Salevsky* el Berlino en siaj publikaĵoj jam kelkfoje donis lokon al interlingvistikaj problemoj kaj Esperanto. Antaŭ nelonge aperis kolekto de ŝiaj plej gravaj lastatempaj eseoj:

*Müller, Ina (2009, Red.): Heidemarie Salevsky: Aspekte der Translation. Ausgewählte Beiträge zur Translation und Translationswissenschaft. Frankfurt/Main usw.: Peter Lang, 373 S., ISBN 978-3-631-58186-5.*

La volumo entenas jenajn tekstojn:

„Läuten die Abendglocken auch in Esperanto? (Zum Problem der Übersetzbarkeit im Blick auf Plansprachen)“, (Ĉu ankaŭ en Esperanto sonoras la vesperaj sonoriloj? <sup>22</sup> Pri la problemoj de tradukeblo rigarde al planlingvoj), p. 169-182.

---

<sup>22</sup> Aludo al la rusa popola kanto “Veĉernyj svon”.

„Sprachliche Gleichberechtigung in der EU – eine Chance für Esperanto? (Ein Kongressbericht, ein Pilotprojekt und einige Hintergründe)“ (Lingva samrajteco en EU – ŝanco por Esperanto? Prikongresa raporto, pilota projekto kaj kelkaj fonaj informoj<sup>23</sup>). p. 183-197.

### 6.3 „Cejano“

„Cejano“ titoliĝas almanako, kiun eldonas la Esperanto-Societo de Tartu/Estonio. Ĝin redaktas la interlingvistoj *Madis Linnamägi* kaj *Enn Ernits*. La 78-paĝaj riĉe ilustritaj kajeroj ofte enhavas interlingvistikajn materialojn. En 2009 aperis la 5-a eldono, i.a. kun kontribuoj de *Aleksandr Duliĉenko*, *Enn Ernits*, *Madis Linnamägi* kaj *Imre Szabó*.

## 7 Novaj revuoj

### 7.1 European Journal of Language Policy/Revue européenne de politique linguistique

En Ipl 71, p. 22, ni informis pri nova lingvo-politika revuo kun enhavo ĉefe rilata al eŭropa lingvo-politiko. Aperas du kajeroj jare. Intertempe aperis la dua kajero por 2009.

#### **Enhavo de Kajero 2 (Vol. 1, Autumn 2009)**

*Michael Kelly*

Editorial

#### Artikoloj

*Sue Wright*

The elephant in the room: language issues in the European Union

*Francisco Lorenzo and Pat Moore*

European language policies in monolingual southern Europe: implementation and outcomes

*Kara D. Brown*

Market models of language policy: a view from Estonia

*Gabriela Meier*

Can two-way immersion education support the EU aims of multilingualism, social cohesion and student/worker mobility?

*Elisabeth Lillie*

Language learners in a global age: challenges and opportunities

#### Intervenoj

*Ian Tudor*

Promoting language learning in European higher education: an overview of strategies

*Michael Kelly*

Two language policy projects in the EU Sixth Framework Programme

The Wulkow Memorandum on Language Centres at Institutions of Higher Education in Europe

*British Academy*

Language matters: a position paper

---

<sup>23</sup> Pri la Nitobe-simpozio 1999 en Berlino, kiun partoprenis la aŭtorino, kaj la projekto ‘NEIGHBOUR’.

David Lammy  
Languages matter

Michael Kelly  
Réflexions sur les enjeux linguistiques en Europe

Indekso por Volumo 1

## 7.2 „InKoj“: Nova interlingvistika revuo en la Interreto

Italaj lingvistoj de la Ŝtata Universitato de Milano kaj de aliaj universitatoj antaŭ nelonge fondis interlingvistikan revuon en la reto. Ĝi aperas en la lingvoj itala, angla kaj Esperanto. La revuo estas rezulto de iniciatoj de *Federico Gobbo* kaj *Paolo Valore* kaj havas la nomon

### „InKoj. Interlingvistikaj Kajeroj“.

Pri la celoj kaj taskoj de la revuo la redaktoroj skribas:

La projekto InKoj (Interlingvistikaj Kajeroj) celas plenumi la bezonon de stud- kaj diskut-loko, je universitata nivelo, pri la temoj rilatantaj la planitajn lingvojn kaj la lingvojn artefaritajn, kaj el la vidpunkto de la logikaj kaj lingvaj analizoj pri la strukturo morfosintaksa kaj leksik-genera (leksik-estiga), kaj el la vidpunkto de la historio de la ideoj, de la epistemologiaj kaj ontologiaj konceptadoj, sur kiuj baziĝas tiuj lingvoj. Temas pri studkampoj precipe filozofia, ĉar ĝi postulas por sia plenumo la diskuton de problemoj pri kategoria taksonomio, pri formala logiko, mistikaj kaj religiaj inspiroj, utopiaj projektoj politikaj kaj artaj. Aliflanke, la interfakeco de tiu studkampoj postulas tion, ke la projekto havu strukturon malfermatan al kontribuadoj de spertuloj pri aliaj fakoj, ekzemple: psikologio, informadiko, matematiko, lingvistiko, ktp... Krome, la revuo sin proponas kiel diskut-lokon por la projektoj de protektado de la lingvo-raĵa egaleco per la uzo de helplingvo, ene de plurlingvaj medioj kiel, ekzemple, la Eŭropa Unio. Se vi opinias ke la revuo povas esti interesa, bonvolu aliĝi kiel Reader (= leganto). Vi ricevos senkoste ĝisdatigitajn informojn pri recenzoj kaj venontaj kajeroj de la revuo.

Kajero 1 de Volumo 1 (2010) havas la kadran temon

„Interlinguistics and Philosophy of Artificial Languages /  
Interlingvistiko kaj Filozofio de Artefaritaj Lingvoj“

**La 80-paĝa kajero havas jenajn kontribuojn, elprinteblajn kiel pdf-dosierojn:**

*Paolo Valore* „La ricerca astratta come creazione di linguaggi. Quasi un manifesto / La abstrakta esplorado kiel kreado de lingvoj. Kvazaŭ manifesto“

*Wim Jansen* “Esperanto: een taal van mij, een taal om van te houden / Esperanto: lingvo malfremda, lingvo aminda“

*Federico Gobbo* “Fondamenti delle grammatiche adposizionali / Fundamentoj de la adpoziciaj gramatikoj“

*Alan Reed Libert* “Comparing Comparatives in Artificial Languages / Komparado de komparativoj en artefaritaj lingvoj“

*Federico Gobbo, Ettore Brocca, Carlo Monti*  
InKoj Stylesheet / Stilfolio por InKoj (Informoj por aŭtoroj).

**Publikaĵojn por recenzoj oni sendu al:** *Prof. Dr. Paolo Valore* - Dipartimento di Filosofia - Università degli Studi di Milano - Via Festa del Perdono 7 - 20122 Milano ITALY/Italio

**Retaliro:** <http://riviste.unimi.it/index.php/inkoj/index>

## 8 Diversaĵoj

### 8.1 Ekspozicio en Rumanio

Fine de Aŭgusto 2009 la Olt-Distrikta Muzeo en Slatino (Rumanio) organizis simpozion kaj foto-dokumentan ekspozicion pri „Momentoj el la historio de la esperantista movado en Rumanio”. Ĝin partoprenis pluraj rumanaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ *Ionel Oneț*, oficisto de UEA. Tiu-okaze ni sendis plurajn ekzemplerojn el la ruman-lingva katalogo de la ekspozicio al UEA.

La ruman-lingvaj afiŝoj kaj katalogo aperis ankaŭ en la jena ret-adreso:

<http://cimec.wordpress.com/2009/08/25/slatina-expozitia-foto-documentara-momente-din-istoria-miscarii-esperantiste-n-romnia-1889-2009/>

D. Neagu, kuratoro de la ekspozicio

### 8.2 GIL en Bremen

De la 17-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro 2009 en la nordokcidentgermana urbo Bremen kaj la ĉirkaŭaĵo de tiu urbo okazis “Festivalo pri Lingvoj”. Ĝi estis organizita de grupo de lingvistoj el la universitato de Bremen, kiuj estis subtenataj de multaj partneroj, kaj enhavis kaj fakajn kunvenojn kaj popular-sciencajn aranĝojn pri la temo “lingvo(j)”. Inter la celoj de tiu 21 tagojn longa festivalo estis montri la gravan rolon, kiujn lingvo kaj lingvoj ludas en la vivo de homoj, alproksimigi al la publiko la lingvan diversecon de nia mondo, pligrandigi la konvinkon, ke necesas lerni lingvojn sendepende de ties ŝajnaj ekonomiaj valoroj kaj ankaŭ informi pri la taskoj de lingvistoj en tiuj procezoj.

La germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) subtenis la aranĝon per tri kontribuajoj. La 7-an de oktobro oni prezentis la sekvajn prelegojn:

“Universalsprachen – von der Utopie zur Realität “ (Universalaj lingvo – de utopio al realeco)  
(*Prof. Dr. Sabine Fiedler*)

„Warum ist Esperanto für Sprachwissenschaftler interessant?“ (Kial Esperanto estas interesa por lingvistoj?) (*PD Dr. Dr. Rudolf Fischer*)

La prelegojn ĉeestis tre interesata aŭskultantaro de po ĉ. 20 personoj. Post la prelegoj *Sebastian Kirf* realigis Esperanto-provkurson, post kiu sekvis vigla diskuto pri demandoj de Esperanto-komunikado, dum kiu kelkaj esprimis sian intereson daŭrigi la lernadon de la planlingvo.

---

**Eldonas:** Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org) . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco kutime estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiu-mondaj regionoj bonvenas. Fakuloj ricevas IpI laŭpete senpage de C.O. de UEA.

---